

la Riverego

ISSN 0830-9574

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia
Somero de 1989. N-ro 15-a. Jarkolekto 4-a

0,75 \$

Terminologie espérantiste à la québécoise

Edmond (Ejmo) Brent, espérantiste longueuillois et linguiste à l'Office de la langue française, dirige du 12 au 21 juin un séminaire de terminologie organisé par le *Terminologia Esperanto Centro de Universala Esperanto-Asocio (T.E.C.)*. Ce séminaire, qui se tiendra à Poprad, en Slovaquie (une des deux républiques fédérées de la Tchécoslovaquie), est destiné principalement aux représentants nationaux de T.E.C.

Récemment fondé, ce centre espérantiste de terminologie a pour but de rendre plus professionnelle la terminologie espérantiste. Ne s'improvise pas qui veut créateur de nouveaux termes techniques. C'est pourquoi T.E.C. fait affaire avec des organismes renommés, comme Infoterm, en relations avec l'Unesco, ou BSO, firme néerlandaise qui développe un système informatique de traduction utilisant une forme modifiée d'espéranto comme langue-pivot

Il est intéressant de rappeler que l'un des fondateurs de la terminologie moderne (et de Infoterm), Eugen Wuster, était espérantiste. L'espéranto a donc assez bonne réputation parmi les terminologues.

Par ailleurs, parmi les organismes renommés, on compte aussi l'Office québécois de la langue française. On ne sait pas toujours que sa banque de terminologie (trois millions de termes) et ses méthodes de travail sont un modèle du genre, à travers le monde. Récemment, par exemple, I.O.L.F. a aidé le gouvernement régional de Catalogne (région du nord de l'Espagne) dans ses efforts pour répandre l'usage technique du catalan.

C'est maintenant l'espéranto qui va profiter de l'expertise québécoise. □

Kasa problemo en K.E.A.

La Kanada Esperanto-Asocio nuntempe frontas grandan kasan problemon: malaperis Flora Raynes, la kasistino. Ne kun la mono, kiel en la filmoj. Male, ĉar la ĉekado bezonas la subskribojn de la prezidanto kaj de la kasistino, la mono de K.E.A. estas tenata plej sekure. Eĉ K.E.A. ne povas uzi ĝin...

Dum daŭras la serĉado de S-ino Raynes, okazas la ordigado de la multaj paperoj, kiuj amasiĝis en skatoloj de jam

pluraj monatoj. Ĉar neniu sciis pri tiu malapero, leteroj daŭre alfluis

Tial pluraj membroj de E.S.K. lastatempe ricevis sciigon, ke ili ne pagis sian kotizon al K.E.A. Oni sciis, ke la mono kaj la informo estis taŭge senditaj, sed al la kasistino, kiu ne plu prizorgis ilin. Se vi ricevis tian leteron, respondu, ke vi pagis al E.S.K., kiu tute certe transpagis al K.E.A. □

Mallonge

El la provizora programo de la Kebekia verda partio: Dans le cadre de tels organismes mondiaux, le respect de l'égalité entre les peuples devra amener l'utilisation d'une langue seconde neutre, telle l'espéranto.

la Riverego

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate. Eldonkvanto: 300.

ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec

Premier trimestre 1986.

Redaktis: Sylvain Auclair.

Kunlaboris Suzanne Bolduc, Kajmo Brent Victor Epp, Manĉelo Kampanjafia, Cyrille Robidoux kaj Petro Roelofs

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo; 6 \$ por aera sendo.

UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 0,75 \$, plus sendekostoj.

Limdato por la venonta numero: 1-a de septembro 1989-a.

Adreso: Esperanto-Societo Kebekia
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montréal, Québec
KANADO H2G 3C8

Rivalo de Esperanto ?

Victor Epp

Jam ekzistas strofoj de prevertaj (Prévert) kaj verlenaj (Verlaine) poemoj en «Uropi», kiun ambicia instruisto de la angla lingvo volas igi «*u janj po Uropa*», la eŭropan lingvon. Joël Landais vidas ĝin kiel duan lingvon por ĉiuj eŭropanoj.

Ĉu tio estas insultego al Esperanto ? Joël, kiu parolas dekon da lingvoj kaj povas manipuli entute dek sep, ĉiutage kreas kelkajn novajn vortojn. De jam dek kvin jaroj li laboras pri tiu projekto.

Laŭ Landais: «Eŭropo, grandega komuna merkato ekde 1993, bezonas komunan lingvon, espereble iun sintezan lingvon.» Li opinias, ke *uropi* devas iĝi tiu lingvo.

Antaŭ multaj jaroj, kiam li ankoraŭ estis studanto en Ŝartro (Chartres), li malkovris monumentan vortaron de la vortradikoj de la modernaj hind-eŭropaj lingvoj. Tiu trovaĵo ebligis lin trovi tion, kio unuigas la vortojn, kiuj nun ŝajnas tiel diversaj. Jen la obsedo de lia vivo kaj lia metodo.

Ĉiu nova vorto, kiun li metas en sian vortaron, estas rezulto de komparo inter la dek sep lingvoj parolataj en Eŭropo. Li elektas laŭ du principoj: la komuna hind-eŭropa radiko, se ĝi ekzistas aŭ la plej uzata formo. La tuto estas ligata per simplega gramatiko, kiun li pruntas el la angla. Tiel la uropia enhavas 30 procente latindevenajn vortojn, 30 procente anglasaks-devenajn kaj 20 procente el la slavaj, greka kaj hispana lingvoj.

Laŭ Joël Landais, tiel estas ekvilibro ne trovata en Esperanto, en kiu la latindevenaj vortoj «superregas»

Landais opinias, ke la zamenhafa lingvo estas «arkaika kaj malfacila», kaj ke ne utilas klopodi modernigi ĝin, same kiel ne utilas revivigi la plurajn internaciajn lingvojn inventitajn tra la jarcentoj far dekoj da studemuloj, inter kiuj Kartezio (Descartes), kaj Lajbnic (Leibnitz), kiuj estas nenio pli ol lingvaj ekzercoj.

Sed «la uropia estas farita por esti rapide lernita kaj uzata de ĉiuj eŭropanoj», diras joël Landais, kiu jam preparis, por la lernigo de sia lingvo, lernolibron, kiu enhavas ties malmultajn regulojn. La adjektivoj kaj la participoj estas nevariaj. Nur la substantivoj prenas virgenrajn kaj ingenrajn formojn. Ekzemple, *bona kato* iĝas *u bon kat*, en la uropia. La verboj tute ne havas malfacilaĵojn. La infinitivo ĉiam finiĝas per *o*: la astempon oni esprimas per demeto de tiu *o*, la istempo per *i* kaj la ostempo per prefikso *re*.

Oni eksperimente instruas la uropian en la mezlernejo de Ŝartro, ekster la normalaj lernejoj horoj. Sinjoro Landais jam iomete famiĝas, ĉar kelkaj ĵurnaloj parolis pri li, ekzemple *Komsomolskaja Pravda*.

Diras Landais: «Se oni parolas pri komuna mono, kial oni ne jam almenaŭ komencu priparoli komunan lingvon ?»

[Victor Epp resum tradukis el *Corriere Italiano*, (semajna montreata itallingva ĵurnalo), 1989.05.10 | 1]

Nun, ĉu Azia lingvo ?

Eble la ĵus prezentita Uropia iĝos la Eŭropa lingvo. Sed kion pri Azio ? Nu, ni sciu, ke « la mongola sciencisto kaj fama tradukisto Cedendambin Bold ellaboris azian universalan lingvon - Jazu... por kiu li vaste uzis la lingvojn ĉinan, mongolan, vjetnaman, japanan, korean, sanskritan, hindian, persan kaj araban. La baza motivo por kreo de la nova lingvo estas ke Esperanto estas farita

subbaze de la eŭropaj lingvoj kaj per ĝi oni ne povas transdoni la diversecon kaj riĉecon de la aziaj kaj afrikaj lingvoj. » Prave, kion pri Afriko ? Kaj pri Ameriko, eĉ ? Ni cetere notu, ke tri el la fontlingvoj de Jazu estas hind-eŭropaj (la sanskrita, la hindia kaj la persa). Ĉu Jazu iom similos Uropi-on ? [*El Esperanto*, majo 1989] □

Why not English ?

John C. Wells, spécialiste des langues anglaise et espéranto, s'est fait interviewer par un espérantophone japonais qui s'intéressait à son attitude face à la langue de Shakespeare dans les domaines internationaux.

Wells fit d'abord remarquer que régulièrement, en Europe, de nombreux touristes japonais, même après maintes années d'études de l'anglais, n'arrivent pas à comprendre les Européens, et vice versa. Le problème linguistique reste, malgré 50 ans d'enseignement de la langue anglaise comme solution à la diversité linguistique.

Maintes caractéristiques de l'anglais en font un langage impropre au rôle de langue commune internationale. Sa prononciation varie d'un pays à l'autre : son orthographe ne permet pas du tout de savoir comment se prononce un mot et vice versa. La grammaire anglaise est trompeusement simple dans les premiers stades, parce qu'on n'a pas beaucoup de changements dans les formes des mots. Mais pour bien comprendre, parler, écrire et lire l'anglais, on doit cependant apprendre une syntaxe plutôt compliquée. Pendant que l'anglais forme *to see, sight* et *visual*, l'espéranto a *vidi, vido, vida*.

Wells ajouta ensuite que la formation de mots anglais donne de grands problèmes. Pour dire *sortie*, le Britannique utilise *way out*, tandis que pour l'États-unien, ce mot signifie *demi-fou, extravagant*. Ce dernier utilise l'expression latine *exit*.

La morphologie de l'anglais cause aussi des problèmes. Ex. : le prétérit est indiqué de la même manière, chez les verbes réguliers, que le participe passé. *Loved* peut être *a aimé* ou *aimé*; cela amène une incertitude. *Doctor murdered*, cela peut signifier qu'un médecin a tué ou qu'il a été tué. Une différence plutôt importante.

Outre cela, l'anglais n'est pas la langue universelle. Dans beaucoup de pays, en grande majorité des ex-colonies anglaises, elle est la langue d'une élite minoritaire, et la grande masse en a une connaissance très limitée, sinon nulle. On devrait peut-être se demander s'il faudrait repenser la chose et adopter une autre solution, qui serait plus juste et appropriée.

En fait, seulement un dixième de la population mondiale a l'anglais comme langue maternelle. Le choix est donc : soit beaucoup de travail pour les neuf autres dixièmes afin d'étudier une langue difficile, soit moins de travail,

pour les dix dixièmes, afin d'apprendre une langue plus simple, l'espéranto.

A la question « Est-ce que l'espéranto vaincra ? », Weils répond finalement : l'espéranto a déjà réussi. Cette langue s'est métamorphosée d'un projet théorique en une langue vivante qui est utilisée comme langue commune, même entre humains de familles linguistiques

très différentes. La pratique nous a montré que l'on se comprend mieux par l'espéranto, beaucoup plus aisément que par l'anglais. C'est un phénomène unique dans l'Histoire de l'Humanité. □

[Résumé et traduit par Martin Lavallée, tiré de SAT-Amikaro, fév. 1989]

Encore l'anglais

Une maison internationale de publicité a récemment effectué une étude pour connaître le niveau *réel* de connaissance de l'anglais chez les Européens de l'Ouest. On demandait aux membres d'un échantillon représentatif d'évaluer eux-mêmes leur niveau de maîtrise, puis on leur faisait traduire trois phrases enregistrées. Les résultats varient beaucoup. Aux Pays-Bas, un peu moins de 50 p. 100 ont pu traduire une phrase donnée, contre 6 p. 100 en Italie. En Belgique, on remarque une différence importante entre les

francophones (6 p. 100 ont pu traduire) et les Flamands (46 p. 100). Les jeunes connaissent mieux l'anglais. Le rapport conclut que le niveau de compréhension de l'anglais est « loin en-dessous de nos attentes les plus pessimistes. »

Pendant ce temps, le gouvernement britannique s'oppose à une recommandation de la Commission européenne, qui veut que tous les étudiants de la Communauté européenne apprennent trois langues étrangères, dont au moins deux seraient européennes. □ [*Esperanto*, mai 1989]

Nederlandano en Saint-Irénée

Petro Rulofido

La rencontre a Saint-Irénée a réuni 17 personnes, dont un Néerlandais, auteur du compte-rendu en espéranto qui est venu suite à une annonce lue dans la revue Esperanto. Il séjournait quand même au Québec pour d'autres raisons. Soirées culturelles visite des galeries d'art de Baie-Saint-Paul, promenade le long du fleuve ou en forêt, souper en commun, entrevue radiophonique de Normand Fleury, ont été au programme.

En la marta numero de *Esperanto* (U.E.A.) mi estis vidinta ke okazos amika renkontiĝo de kebekiaj esperantistoj de la 20a ĝis la 22a de majo kaj ĉar ni planis esti tiutempe en Kebekio, mi petis informojn. Kaj tiel okazis ke mi povis partopreni en ĉi tiu intima kunveno de grupeto de kebekiaj samideanoj en ĉarma parto de Kanado,

ĉe la norda bordo de la tie jam salakva riverego Sankta Laŭrenco.

Ni estis tie deksepope, kaj inter la 17 estis 5 junaj infanoj, inter kiuj du, Damir kaj Mira, estas trilingvuloj. Por mi iom mirige estis ke inter la 3 lingvoj kiujn scipovas paroli ĉi tiuj infanoj kanadaj ne estas la angla. Inter la ceteraj estis 5 virinoj kaj 7 viroj. El ili du

trionoj estis jam spertaj esperantistoj kaj unu triono ankoraŭ komencantoj. La renkontiĝo devis servi al tio, ke ankaŭ izolitaj novuloj havu okazon praktiki la lingvon kaj ricevi kontakton kun la movado.

Mi havis okazon kunveturi kun Régis Ostigny, juna arkitekto, kiu rakontis al mi iom pri sia patrinflanka avo, indiano, kiu instruis lin pri tio, kio manĝebla troviĝas en la arbaroj per kio oni povas vivteni sin, kaj iom pri sia alia avo, iama germana diplomato de vaska deveno, kiu en 1934 ekloĝis en Kanado. Post ĉ. kvinhora veturado ni alvenis vendredon vespere al nia celo: «*Domaine Forget*», kultura kaj feria centro kie troviĝas bone ekipitaj feriaj loĝejoj por poe 5 personoj maksimume.

Sabaton matene – ĉe belega vetero – mi faris promenadon tra la nun printempe ekverdaj arbaroj troviĝantaj en tuja proksimo. Posttagmeze, unu post la alia, alvenadis la aliaj partoprenantoj. Por mi estis unu malfacilaĵo: mi estis supozinta ke tie ni ricevos ne nur tegmenton super la kapo kaj liton por dormi, sed ankaŭ ion por plenigi la stomakon. Tamen tiel ne estis. Feliĉe Zdravka, la patrino de Damir kaj Mira, invitis min manĝi kun ili: ŝi havis sufiĉan provizon da vegetaraj manĝaĵoj, parte mem-faritaj. Refoje koran dankon, Zdravka, pro via gastameco.

Sabaton vespere ni iom ludis per kartetoj kun bildoj de diversaj objektoj, floroj, fruktoj, bestoj, ktp., por tiel pliampleksigi la vortoscion. Damir vigle partoprenis la ludon. Poste Silvano Bélisle jongladis por ni per divesspecaj pilkoj kaj per kluboj aŭ kegloj, kaj li instigis aliajn ankaŭ fari tion. Tia ŝetado kaj kaptado per tri aŭ kvar pilkoj estas tre bona ekzerciĝo kaj ĝi estas kvietiga kaj invitas al duma meditado.

La vespero finiĝis per komuna aŭskultado al Radio Bern, kie Claude kaj Andrée Gacond daŭrigis sian legadon el «*Aventuroj de Pioniro*» de Edmond Privat.

Post la helvetera sabato la nubĉiela kaj iom pluva dimanĉo iom elrevigis. Tamen, tio ne retenis nin. Matene ni iris al la bordo de la riverego (aŭ golfo?). Tie nelonga moleo etendiĝas en la golfon. Ambaŭflanke ĝin protektas

kontraŭ la furiozado de la elementoj, larĝaj strioj da amasigitaj rokpecegoj. Jen subite Ivo-Mario, kiu surloke organizis la eventon, iom post iom malaperis en truo inter la rokaĵoj. Lin sekvis Damir (kies nomo ne signifas: *Jes, Paĉjo!*, sed *Jes, Paco!*). Ilin simple glutis la moleo. Tamen, nelonge poste ĝi elsputis la knabeton. Sed Ivo-Mario kondukis kiel grebo, akvobirdo kiu subakviĝas en unu loko kaj elmergiĝas poste en alia loko, kaj jen li post «*speleologia ekskurso*» reaperis en kelka distanco tra alia truo. Post nia nelonga restado ĉe la bordo ni faris ankoraŭ nelongan promenadon.

Posttagmeze, ni ĉiuj iris vizitadi plurajn artgaleriojn. Tiu regiono estas vere ĉarma kaj multaj pentristoj ekloĝis tie kaj en siaj galerioj ekzpozicias kaj – laŭeble – vendas siajn verkojn. Rigardinte multajn pentraĵojn, ni kune manĝis en tiuloka restoracio. Por vegetaranoj la elektoeblo estis iom limigita, ĉar svarmis sur la menuo manĝaĵoj kun omaro, langusto, mituloj, salmo, ktp. Tamen ankaŭ havebla estis – kaj eĉ ne multekoste – kombinaĵo de vegetaraj supoj kaj salato, kunmetebla laŭ propra elekto, gusto, kaj apetito.

Hejmen veninte ni havis ankoraŭ vesperan programon, en kiu mi deklamis kelkajn poemojn kaj Silvano Bélisle, kiu pasigis staĝon duonjaron en la Kultura Centro de Esperanto en La Chaux-de-Fonds, montris lumbildojn kaj interese rakontis pri la grava esperantisto Edmond Privat (naskita en 1889) kaj pri kanada Esperanto-pioniro el la komenco de la jarcento.

Lundon matene denove ĉielo kovrita de grizaj nuboj, kaj nebuloj kiuj jen kaŝis la suprojn de la montetoj, jen kuŝis en intermontoj. Matene je la naŭa okazis dekminuta pertelefona radiointervjuo kun Normando Fleury. Mi ja aŭdis la franclingvan elsendon, sed sukcesis kapti ne pli ol kelkajn vortojn. Onidire la intervjuisto ne faris stultajn demandojn, kaj Normando senhezite kaj flue respondis al la demandoj. Sed ne demandu min, kion li diris.

Post manĝo kaj pakado Régis kaj mi foriris la unuaj. Tiel finiĝis ĉi tiu sukcesa, amiketosa renkontiĝo. □

La Unua Ontario Esperanto-Kongreso naskas

Manŭelo Kampanjafia

Gojplene la Unua Ontario Esperanto-Kongreso (OEK-1) anoncas la naskon de sia ido: *Ontario Esperanto-Asocio (OEA)*. OEK-1 okazis la 1989.05.19-22-ajn ĉe Otav-Universitato en Otavo.

Statistiko

Entute aliĝis OEK-1 33 ontarianoj kaj 4 kebekianoj, el kiuj 14 ontarianoj kaj 3 kebekianoj fakte ĉeestis la Kongreson. Aldone donacetis sed rifuzis aliĝi 2 ontarianoj kaj 0 kebekiano, el kiuj 1 ĉeestis vendrede la antaŭkongresan interkonan vesperon; ankaŭ 6 aliĝintoj malavare donacetis.

Inter la ĉeestintaj kongresanoj troviĝis 3 instruistoj, 3 mezlernejanoj, 3 programistoj, 3 tradukistoj, 2 diplomatoj, po 1 bibliotekisto, poŝtisto, sociikisto. Plejparte ili naskiĝis en Kanado. (..)

Dum OEF-1 okazis en 3 matenoj kunsidoj la 1-a eksterordinara ĝenerala kunveno de OEA kaj dum 2 vesperaj kunsidoj la 1-a estrar-kunveno. La kongresanoj ĝuis 5 bongustajn etnostilajn (ĉiokaze ajna hinda, helena, ĉina kaj transkanada tradicioj) vegetarajn manĝojn, liberan sabatposttagmezon kaj dimanĉposttagmezan akcepton ĉe kanada UEA-ĉefdelegito Merlo Haltreĥta (*Merle Haltrecht*). Dumkongrese loĝadis Marjo Fonseka (*Mario Fonseca*).

Gratuloj kaj bondeziroj venis el multaj lokoj, intere el 3 organizoj: Esperanto-Societo Kebekia, Junaj Agantoj de Esperanto kaj Kanada tradukista kaj Interpretista Konsilantaro nek Kanada Esperanto-Asocio nek Universala Esperanto-Asocio sendis mesaĝon.

Belveteris ĝis la sabatvespero kiam ekaĝiĝis dum la temperaturo draste malaltiĝis. Lundvespere (post la kongreso) la vetero rebeliĝis (post la ribeliĝo) kaj la temperaturo realtiĝis (kaj Rialtiĝis). Fakte la vetero ofte malagrablas dum la semajnfinoj en

Otavo (Pri tio sendube kulpas la neEsperantistoj.)

Amaskomunikiloj

La oficiala organo de Otav-Universitato GAZETO (*Gazette*) anoncetis la 1989.05.05-an la baldaŭan kongreson kaj otava franclingva tagjurnalo DROIT (*LeDroit*) raportis la 1989.05.23-an la jusan eventon. (..)

Celo

Kiel otava urbestro Ĝejmzo Dorela (*James Durrell*) menciis en SIA-proklamo lastfebruare, OEF-1 celis «fondi provincan Esperanto-organizon, kies idealo devus esti la antaŭenige de interesaj interkompreno kaj interkomunikado en Ontario».

Agadplano

Tiacele OEA adoptis ambician agadplanon en kvar punktoj.

1. STATUTO pretigota por formala adopto de OEF-2 pretigota por agnosko de la ontario registaro plej malfrue por 1991-2 pretigota por akiri de provinca statuso plej malfrue por OEK-4.

2. FUNVENOJ organizotaj kongresoj, sezonaj renkontiĝoj, ktp.


3. EADRO-KURSOJ okazigotaj prelege kaj librolerne. Ekzemple: lerne partopreni ĝeneralan kunvenon... «Kiel izole aktivi antaŭ ol scipovi Esperanton».

4. EESTRAFRIHATOJ kun la provinca registaro kaj provincnivela asocioj kaj entreprenoj por akiri iliajn subtenon kaj subvenciadon kaj korespondan kurson de la ontario Eduk Ministerio (similan al tiu iama de Brita Kolumbio).

Estraro

Por aranĝi la plenumadon de sia agadplano la fondkunveno elektis Estraron, kiu konsistas el

1. Sekretario-kasisto: Gregĉjo Medouza (*Greg Meadows*), el Otavo.



2. Dua vicprezidanto: Marteno Lavalea (*Martin Lavallée*), el Amablo de Kebekio;

3. Unua vicprezidanto: Iano Riĉmonda (*Ian Richmond*), el Londono;

4. Prezidanto: Manŭelo Kampanjaña (*Manuel-M. Campaña*), el Olavo. □

Nouvelles du monde

par Cyrille Robidoux

L'espéranto dans les pays anglophones

Une association sans but lucratif visant à permettre aux enfants du monde entier de se connaître par l'espéranto a été fondée aux États-Unis. La présidente, Charlotte Kohrs, a déjà ouvert un cours pour 180 enfants et enseignants de 6 écoles élémentaires de Californie. L'association publie un bulletin bilingue de six pages xérogaphiées. Pour informations: Children Around the World (Infanoj ĉirkaŭ la mondo), 3876 Belmont Ave., San Diego, CA 92116, États-Unis / Usono.

Sat-Amikaro, mars 1989

L'anglais, langue internationale?

Le Dr John C. Wells, l'un des plus éminents spécialistes de la prononciation de la langue anglaise et professeur de phonétique au London College University, est aussi un brillant espérantiste. Lors d'une conférence présentée en 1987 au Centre Pompidou, à Paris, John Wells s'est interrogé précisément sur l'adéquation de l'anglais pour jouer le rôle de langue internationale. Cette conférence en espéranto existe sous forme de cassettes: « Kial ne la angla? » On en trouvera un résumé ailleurs dans ces pages.

Sat-Amikaro avril-mai 1989

L'espéranto à la radio

La station de radio France Inter a diffusé un cours d'espéranto durant le mois

d'août 1988. Ce fut un succès, car plus de 5 000 personnes ont en effet réagi très favorablement par écrit ou par téléphone. Or, il est connu que les personnes qui réagissent ne représentent qu'une petite partie de celles qui sont intéressées.

Sat-Amikaro, avril-mai 1989

Zamenhof en bandes dessinées

Une nouvelle bande dessinée de 20 pages en quadrichromie, « L'espéranto ou la vie de Zamenhof », devrait contribuer à mieux faire connaître ce personnage à la fois modeste et extraordinaire, grâce auquel des millions de personnes ont découvert une autre idée de la communication. Elle a été dessinée par un professionnel du journal Tintin, Bruno Disano, sur un scénario de Ghislaine Tilleux, avec la collaboration de Jean-Marc Derzelle, un enseignant espérantiste belge.

Sat-Amikaro, avril-mai 1989

L'espéranto bien représenté dans le domaine des échecs

Les trois sœurs Polgar, de Hongrie (Zsuzsa, 19 ans, Szofia, 17 ans, et Judith, 13 ans) ont connu un grand succès lors des Olympiades mondiales d'échecs, qui ont eu lieu en novembre dernier. Toutes trois espérantistes, elles formaient la majeure partie du groupe hongrois qui a vaincu l'Union soviétique. Judith a été particulièrement brillante avec 12 victoires et un ex æquo sur 13 parties.

Sat-Amikaro, avril-mai 1989 □

Miser sur l'espéranto ?

Histoire d'une langue bien mal partie

Claude Piron

Tout a commencé en Pologne dans les années 1870. Bialystok est alors une ville quadrilingue : on y parle polonais, yiddish, russe et allemand. Dans cette bourgade, qui fait partie de l'empire des tsars, un jeune garçon vit de douloureuses blessures psychologiques, crucifié qu'il est entre quatre communautés, quatre religions, quatre langues (et quatre alphabets), quatre haines. Là, bien plus qu'ailleurs, le simple fait de s'exprimer vous catalogue. Ou vous vous exposez au mépris, ou vous vous assurez une complicité. Tout événement se déroule sur un arrière-fond d'identités ethnoculturelles exacerbées. Si un Polonais a un problème administratif à régler, il est impensable que le fonctionnaire russe parle la langue de son interlocuteur, mais c'est la mort dans l'âme et l'esprit de vengeance au cœur que le Polonais baragouine sa requête en russe.

Rilke a dit un jour qu'un écrivain était quelqu'un qui écrivait parce qu'il ne pouvait pas s'en empêcher. Le jeune Zamenhof a jeté les bases de l'espéranto pour la même raison : parce qu'il ne pouvait pas faire autrement. Les identités culturelles étaient vécues, à Bialystok, comme mutuellement agressives. Or, leur manifestation première était la langue, et l'accent. Dans ce contexte, employer la langue de l'autre, ce n'est pas seulement lui reconnaître une supériorité contre laquelle l'amour-propre se révolte, c'est aussi s'astreindre à une infinité d'acrobaties grammaticales, lexicales et phonétiques, c'est parcourir un terrain semé de pièges qui semblent placés là pour mieux vous faire tomber dans le ridicule et l'infériorité.

Ce climat d'hostilité et d'humiliation traumatise Zamenhof, garçon à la fois sensible et surdoué. La situation est

intolérable. Il faut faire quelque chose pour que chacun, tout en gardant sa culture propre, puisse communiquer avec autrui sans ces blessures d'identité socioculturelle qui forment la trame de la vie quotidienne à Bialystok.

Pour cela, il faut une langue qui n'appartienne à aucun peuple et dont les structures suivent le mouvement naturel de l'expression linguistique, une langue où l'on ne doit pas faire d'acrobatie, une langue accessible aux petits, aux obscurs, aux sans grade. Avec la foi naïve de la jeunesse, l'adolescent se met au travail, associant la logique implacable de l'enfance, dont il est encore si proche, à la méthode de l'artiste, qui vise la beauté et ne cesse de polir et de repolir son œuvre.

Quelles chances a-t-il d'aboutir ? Raisonnons, si vous le voulez bien, en parieurs. Vous auriez parié, vous, pour l'œuvre d'un garçon de dix sept ou dix huit ans, perdu dans une petite ville provinciale d'un pays provincial, qui s'était attelée à une tâche démesurée : donner l'impulsion à une langue nouvelle ?

Reprenons cette histoire étape par étape. Voici que le père du jeune homme l'envoie étudier au loin et lui fait promettre de cesser son jeu linguistique. N'est-il pas réaliste de prévoir que le garçon va comprendre l'absurdité de son projet ? En fait, il persiste. Quand il aura vingt-sept ans, il décide de publier le fruit de son travail. Il fait le tour des éditeurs. Mais ces hommes ne sont pas fous : aucun n'en veut. Il fera donc imprimer à ses frais une petite brochure, minable, car il n'a guère d'argent. Sans accès à un réseau de librairies, quelles chances a-t-il de la diffuser ? Vous miseriez sur lui, un parfait inconnu, à ce moment-là ?

Malgré tout, quelques adeptes...

Le projet fait tout de même quelques adeptes, essentiellement dans l'Empire russe. Une revue commence à paraître dans cette ébauche de langue. Tolstol, enthousiasmé par elle, se met à y écrire. Mais il tombe en disgrâce et la censure tsariste interdit cette publication, seul lien existant entre ces premiers usagers. Apprenant cette nouvelle, vous parieriez, vous, qu'une langue vivante naîtra progressivement d'un projet aussi mal parti ?

Mais la vie n'est pas logique. Dans les cinq parties du monde, des gens découvrent ce langage et se mettent à l'apprendre. Les linguistes se gaussent : chaque locuteur, disent ils, va être victime de ses habitudes phonétiques, grammaticales, sémantiques. Ces gens ne se comprendront pas. Pour qui pariez-vous, à ce moment-là ? Pour le jeune amateur, ou pour les spécialistes unanimes ?

Certes, au premier congrès à Boulogne-sur-mer, en 1905, les usagers de la langue se comprennent parfaitement, mais pourquoi prendrait-on au sérieux un petit groupe de farfelus ? Dans l'optique des salons parisiens qui, à l'époque, donnent le ton pour tous et sur tout, la langue n'est pas faite pour séduire. Elle est pleine de *ĉ*, de *ĵ*, de consonnes affublées d'accents circonflexes ridicules. Elle donne une impression d'étrangeté et de barbarie. Toute l'intelligentsia du monde, ou à peu près, la rejette. Le manque de réalisme de l'auteur apparaît d'ailleurs dans le choix saugrenu de consonnes à circonflexe qui n'existent dans aucune imprimerie, de sorte que, si l'on veut publier quelque chose dans cette langue, il faut commencer par faire fondre de nouveaux caractères d'imprimerie. Allons, un peu de bon sens ! Parier ne fût-ce que pour la survie de cette langue, c'est jeter son argent par les fenêtres.

Le guerre de 1914 éclate Zamenhof meurt. Faites vos jeux, Mesdames et

Messieurs. Qui accepte de miser sur cette langue orpheline, symbole de relations entre égaux dans un monde agité par la loi du plus fort ?

Nous arrivons aux années 20. À la Société des Nations, la délégation iranienne propose d'adopter l'espéranto dans les relations internationales. Ahurissement général ! Et branle-bas de combat chez les grandes puissances « Il faut enterrer ce projet, dangereux pour notre suprématie culturelle ! » Ces États sont influents et riches, leurs délégués ne reculent pas devant la mauvaise foi la plus éhontée. Une fois encore, le projet est ridiculisé et écarté. Honnêtement, est-ce que vous auriez misé ?

Persécutions

Voici l'avènement de Staline et d'Hitler. Pour Hitler, l'espéranto est la langue de conspiration juive et des francs-maçons ; pour Staline, celle du cosmopolitisme bourgeois. Dans les années 40, ces deux hommes exercent le pouvoir sur la quasi-totalité de l'Europe continentale. L'espéranto est interdit, ses stocks de livres sont liquidés, bon nombre de ses partisans sont enfermés dans les camps de concentration. Au Japon, en Chine, en Espagne, au Portugal, les régimes au pouvoir pratiquent à son égard une politique moins violente, mais qui va dans le même sens. Pour quelle issue raisonnablement parier à cette époque, sinon pour la mort de l'espéranto à bref délai ?

La fin de la Deuxième Guerre mondiale voit l'entrée en scène de l'interprétation simultanée. Celle-ci résoud apparemment le problème de la communication dans les congrès et conférences mais, en fait, elle déguise mal une évolution qui donne à l'anglais une suprématie incontestée. Il est manifeste pour tous que l'anglais tend au monopole dans les relations internationales. C'est la langue des agences de presse, des multinationales,

de l'édition scientifique aussi bien que des chansons sur lesquelles, dans le monde entier, danse une jeunesse habillée à l'américaine.

Face à ce Goliath, l'espéranto est un David, petit au point d'être pratiquement invisible. Voyant les rivaux en puissance, qui, raisonnablement, va parier sur lui ? Comment miser sur une langue que ne soutient aucun vaste mouvement social, que les puissances d'argent ignorent, que les médias passent sous silence, que l'intelligentsia dénigre ou croit mort-née ? Abondamment agressée tout au long de son histoire, tant sur le plan de la politique que des idées, elle n'a aucun allié, aucune aide extérieurs. À une époque où l'image est reine, elle n'a pas les moyens de se faire de la publicité. Elle n'a pour se propager que ses qualités intrinsèques.

Un progrès constant

Et, cependant, si l'on se fonde sur des critères objectifs, comme la production de livres, la participation aux réunions internationales, l'aire géographique couverte par les petites annonces de la presse espérantophone, la quantité de manifestations, les émissions régulières à la radio, le nombre de localités où la langue de Zamenhof est représentée, etc., on s'aperçoit que, avec des hauts et des bas, suivant les aléas de la vie politique et économique, l'espéranto n'a jamais cessé de se propager et que, depuis une dizaine d'années, en particulier, sa progression connaît une remarquable accélération.

Si, en 1976, 30 universités l'enseignaient, on en compte cette année [1986] 125, soit une multiplication par plus de 4 en dix ans. L'espéranto sert de véhicule à une production littéraire considérable, qui va en se développant. C'est la langue du monde dans laquelle on traduit le plus de chansons. Il est parlé chaque jour à la radio dans des pays aussi différents que la Chine et la Pologne. Il est le moyen de

communication quotidien de nombreux couples binationaux. Il est la langue maternelle d'un certain nombre d'enfants. Et l'étude objective du rapport efficacité / coût le révèle, dans la communication interculturelle, bien supérieur à l'anglais ou au recours à la traduction et à l'interprétation simultanée.

Si vous aviez tenu entre les mains la petite brochure de Zamenhof, en 1887, auriez-vous imaginé qu'un peu moins d'un siècle plus tard [en 1986], le congrès international le plus vaste de toute l'histoire de Chine (5 000 ans) se déroulerait en cette langue, dont le germe tout neuf se présenterait à vos yeux ? Auriez-vous parié à cette époque qu'en 1986, il ne se passerait pas un seul jour sans qu'il y ait quelque part dans le monde une conférence, un congrès, une rencontre internationaux tenus en espéranto ? Telle est pourtant la réalité.

Pourquoi cette persistance ?

Ce décalage entre des paris sensés et la réalité vérifiable devrait nous interroger. En fait, tous ces jugements négatifs partent d'une même erreur : on néglige de vérifier la réalité, c'est-à-dire de déterminer comment l'espéranto fonctionne en pratique par comparaison avec les autres systèmes de communication en usage dans les situations interculturelles. En outre, on surestime les pressions extérieures et sous-estime le rôle de l'affectivité individuelle dans un processus de propagation et de vitalisation linguistiques.

Si la langue de Zamenhof manifeste une vitalité plus grande que certaines langues à statut officiel, comme le gaélique et le romanche, c'est parce que l'être humain aime créer, jouer, être libre et aimer.

Les structures de l'espéranto stimulent la créativité langagière, brimée chez chacun, dans les autres langues, depuis l'entrée à l'école. Elles

donnent au langage une coloration ludique qui suscite le mépris des gens qui se prennent au sérieux, mais qui répond à une demande psychologique importante ancrée dans nos tréfonds. Par sa souplesse grammaticale, lexicale et stylistique, l'espéranto donne un sentiment de liberté dans l'expression qu'aucune langue ne confère au même degré, et ce, sans imposer de longues années d'étude. Et, surtout, il permet de nouer des amitiés réelles et durables par-delà les frontières culturelles et répond ainsi à un besoin affectif plus profond qu'on le croit généralement.

Le fait est qu'en un siècle d'existence, l'espéranto a tissé sur toute la surface du globe d'innombrables réseaux d'amitiés entre personnes de toutes les couches

sociales, de tous les milieux culturels. Sur ce terrain-là, il n'a pas de rival.

Il serait en droit de regarder de haut tous ceux qui, depuis un siècle, perdent leurs paris contre lui. Mais ce n'est pas son style. Il ne s'impose pas. Il lui suffit d'être, et de vivre. Disponible, pour ceux qui veulent jouer le jeu. Discret, voire invisible, pour ceux qui lui préfèrent des systèmes plus coûteux, plus injustes et plus compliqués. Tout juste attristé qu'on le prenne si souvent pour ce qu'il n'est pas et qu'on perçoive si mal encore tout ce qu'il peut apporter, dans les relations entre les peuples, non seulement à l'amitié et à la facilité, mais aussi à la justice et au respect de la dignité linguistique de chacun. □

Informoj pri la Societo

Karitataj kvitancoj

Ni finfine ricevis el Otavo la rajton eldoni oficialajn kvitancojn al donacintoj. Ni devus baldaŭ ricevi tiun rajton ankaŭ el Kebeko. La lastatempaj donacintoj ricevos kvitancon (almenaŭ por kanada imposto).

Informa kampanjo

Multaj membroj lastatempe ricevis afiŝetojn por meti en sia ĉirkaŭaĵo. Espereble okazis la dismetado, eĉ se ne venis multaj informpetoj. La estraro nun esploras pri septembra informado en universitatoj kaj per gazet-reklamoj.

La koresponda kurso franclingva nun havas novan korektanton: Silvanon Quirion. Dankon al Suzana Bolduc, kiu dum kelkaj jaroj sole ĝin prizorgis.

Hull: la renkontiĝo okazos la 28-an kaj 29-an de oktobro. Signu tiujn datojn en via taglibro. La temo estos *religio* (ni dormos en monaĥejo); la venonta

Riverego estos samtema: sendu artikolojn.

Duaklasa sendado

Ni bedaŭrinde ne ricevis la rajton sendi *la Riveregon* per duaklasa sendado, ĉar asocio (kontraste al eldonejo) ne rajtas tiel sendi ĝeneral-informan revuon.

Libroj

Ni daŭre donacadas la librojn *Nouveau cours d'espéranto avec ou sans professeur* al diversaj lokoj: ni nun zorgas pri la urbaj librorpruntejoj; kaj ni eĉ sendos al membro nuntempe en Burundio.

Turisma rondvojaĝo

Ties preparado bone progresas: ni ja devas ĝin reklami ĉi-somere, dum la kongresoj. Estos du flankoj: bicikla kaj aŭtobusa rondvojaĝoj. La aŭtobusuloj plej ofte dormos en montreala lernejo, kaj tendumados la biciklantoj. La tuto daŭros 14 tagojn, kaj estos komunaj partoj: vizito de Montrealo kaj Kebeko, interkona vespero. □

Nouvelles de la société

Hull: la S.Q.E. organise les 28 et 29 octobre une rencontre à Hull. À inscrire dans son agenda. La rencontre aura pour thème les religions (nous logerons dans un monastère). Pour stimuler la discussion, le prochain *Riverogo* aura le même sujet ; proposez des articles.

Été 1990

Avant les congrès à Cuba, la S.Q.E. invite les espérantistes d'Europe (et d'ailleurs) à s'arrêter au Québec. Deux formes sont offertes : en autobus (on dormira le plus souvent à Montréal) et en cyclo-camping. Certains éléments de programme seront communs. □

En Ŝerbruko

Ci-junie finiĝas la lasta Esperanto-kurso en la ŝerbruka mezlernejo *Le Triplet*. Dum du jaroj, po unu klaso de mezlernejanoj spertis ordinaran kurson de Esperanto, sub la gvidado de ŝerbruka Esperantisto. Sed la mezlernejo deziras remeti kurson pri la hispana, kaj ekzistas nur unu instruisto por ambaŭ lingvoj. Unu devis defali.

Cetere, la Ŝerbruka Esperanto-Societo daŭre regule kunvenas, vendrede, du

fojojn en monato : unu fojon en universitato, unu fojon en restoracio. Por informo, oni telefonu al Trefleo Mercier, (819) 566-0732.

La kurso en la universitato daŭras, sed ne multaj studentoj emas ekmovadiĝi. La studentoj estis invititaj al movada prezento je la zamenhofa festo. □

Al muso

Robert Burns, 1785

Poemo kreata kiam poeto mem gvidis plugilon kaj trafis muŝneston ; helpante velis postkuri kaj mortigi per plugbastono la besteton.

Eta, glata, kaŭranta, timema besto,
Aĥ, kia paniko pulsas en via brusteto !
Ne necesas ke vi ekforkuru tiel haste
Per stumblaj paŝetoj !
Mi malinklinas kuri por vin ĉasi
Kun plugbastono en manoj !

Mi vere bedaŭras ke la homa superregado
Rompis la de-Naturan socian ordon
Kaj pravigas tiun misopinion,
Kiu vin konsternas
Pro mi, via kompatinda, terida kunulo
Kaj kunmortemulo !

Mi ne dubas ke, foje, vi ŝteletas ;
Ĉu tiam ? kompatinda besteto, vi devas ja vivi !
Maizspiko el garbo

Estas ja malgranda postulo :
Mi ricevos benon el la restaĵo,
Sen ajna manksento !

Via dometo ankaŭ ruinigita !
Jen la ventoj dispersas ĝiajn vandetojn !
Sen nenion lasi por konstrui alian
Sur la verda herbejo !
Kaj baldaŭas decembraĵaj ventoj,
Kaj mordantaj kaj akraj !

Vi ja antaŭvidis la kampojn nudajn, dezertigitajn,
Kaj la baldaŭantan vintron.
Kaj komforte tie ĉi, sub la blovego,
Vi intencis loĝi
Gis - frakasego ! kruela plugilfero trapasis
Vian dormĉambron.

Tiu amaseto da folioj kaj stoplo,
Vin ja kostis multaj lacigantaj mordetoj !
Nun vi estas elpelita spite al ĉiuj viaj klopodoj,
El domo aŭ loĝejo,
Por elteni la vintran neĝpluvon
Kaj malvarmegan prujnon !

Sed museto, vi ja ne estas la sola
Kiu pruvas la eblan vanon de antaŭzorgo ;
La plibone elpensitaj planoj de musoj kaj homoj
Ofte iras mise
Kaj lasas al ni nenion krom afflikto kaj doloro,
Anstataŭ promesitan ĝojon.

Tamen vi estas benita pli ol mi !
Nur la nuno tuŝas vin ;
Sed aŭ mi ! mi rigardas retroen
Vidante nur mornajn prospektivojn !
Kaj antaŭen, ankaŭ se mi ne vidpovas,
Mi konjektas kaj timas !

Tradukis el la skot-angla Victor Epp



Ĝenerala kunveno

La estraro de la Esperanto-Societo Kebekia oficiale invitas ĉiujn voĉdonrajtajn (kaj aliajn) membrojn de la Societo ĉeesti la jaran ĝeneralan kunvenon, kiu okazos sabaton, 26-an de aŭgusto de 1989, ekde la 13-a horo, ĉe 6358, rue de Bordeaux, en Montrealo.

Tagordo

0. Malfermo : elekto de kunvestro kaj de protokolanto ; akcepto de la tagordo ; akcepto de la lastaj protokoloj.
1. Raportoj de la estraranoj kaj demandoj.
2. Statut-ŝanĝoj.
- 3. Elekto de nova estraro.**
4. Diskuto pri venonta agado
5. Fermo.

Ni kore invitas ĉiujn membrojn kandidatiĝi al estrara posteno. Eblas per du manieroj : parole, dum la ĝenerala kunveno, aŭ skribe, per letero, kiun ricevu la prezidanto ĝis la dato de la kunveno. La estraranoj poste elektos elinter si la ĉefestraranojn : prezidanton, vic-prezidanton, sekretarion-kasiston.

Vi sciu, ke la estraro kunvenas unu vesperon, pli-malpli ĉiun sesan semajnon, ĝis nun nur en Montrealo. Dum tiuj kunsidoj, ĝi faras decidajn agadojn kaj disdividas inter si la taskojn farotajn.

Cetere, eĉ ne estraranoj povas partopreni al la taskoj. Simple proponu vin.

Por la estraro, la sekretario kvernis



Sylvain Auclair

La Riverego

Esperanto-Societo Kebekia
Somero de 1989. N-ro 15-a.

Ĉi-numere :

Miser sur l'espéranto ?

Al muso, de Robert Burns

Lingvoj, langues, languages

Alvoko al ĝenerala kunveno

Nederlandano en Saint-Irénée

Fondiĝis. Ontaria Esperanto-Asocio



Société québécoise d'esperanto
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montréal H2G 3C8